**AIS invitas kanditatojn por la Premio Pirlot (plej bonaj sciencaj libroj)**

La Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) invitas kandidatiĝojn por la Premio Germain Pirlot 2026 por la plej bonaj sciencaj libroj. Ĝi estos disdonita dum la 111-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Graz, Aŭstrio. La sumoj de la premio estos 500, 300 kaj 200 EUR por respektive la unua, dua kaj tria lokoj. Kandidatiĝojn por la Premio Pirlot eblas sendi ĝis la **30-a de junio 2026** al info@ais-sanmarino.org.

Paralele ankaŭ estos disdonita la Premio Charles Power por por la plej bonaj sciencaj prelegoj dum la UK. Ĉi-jare la UK gastigos krom la 79-an Internacian Kongresan Universitaton (IKU), ankaŭ la 43-an Sciencan Universitatan Sesion (SUS) de AIS*. Kandidatas por la Premio Power 2026 ĉiuj prelegoj de IKU, SUS kaj Scienca Kafejo. Pliaj detaloj: https://uea.org/aktuale/komunikoj/2026/111a-UK-Graz-UEA-kaj-AIS-informas-pri-la-sciencaj-premioj-Pirlot-kaj-Power-2026.

*Tio modifas la informon pri SUS-43 aperinta en la revuo Esperanto, en aprilo 2026. Intertempe AIS decidis organizi SUS kadre de la UK en Graz.